

Meĥanismo de Antikithera

La meĥanismo de Antikithera, ankaŭ nomata *astrolabo de Antikithera*, estas ĉ. 2100-jara bronza (jam ŝtoniĝinta) horloĝsimila meĥanismo kaj estis turnebla per ekstera prenilo. Elias Stadiatos, greka kaptisto de sponĝoj, malkovris ĝin en la 17-a de majo 1902 ĉe Antikithera, ĉ. 40 m sub la maro, nun ĝi troviĝas en la greka Nacia Muzeo de Ateno. Oni supozas, ke ĝi estis produktita en la insulo Rodos.

Oni povis movi la movilojn pri la sunosituoj kaj lunosituo. La meĥanismo enhavas ĉ. 30 dentoradojn, kies proporcio unu al la alia helpis al la sciencistoj por kompreni ĝin. Evidentiĝis ke unu proporcio estas 254:19, kio estas la rilata nombro de ĉieliro de suno kaj luno. La rentgena analizo okazis nur en 1971, 1993 kaj denove 2005. Ekde 2006 oni pluanalizis supozitajn surskribojn. En la jaro 2008 la laborgrupo de *Antikythera Mechanism Research Project* esploris la malantaŭan flankon de la konstruaĵo pli detale kaj interpretis ĝin.

La nomoj de la monatoj sur la du diskoj de la malantaŭa flanko estas korintaj. Per la suba disko montriĝas luneklipsoj kaj suneklipsoj. Sur la antaŭa flanko troviĝas nur unu disko, tie la monatomoj devenas el la egipta kalendaro. Tiu disko montras la movadon de la suno, luno kaj videblaj planedoj. La meĥanismo helpis la ŝipadon de la antikvaj grekoj. Tiun tezon publikigis Derek de Solla Price en 1959, en artikolo de "Scientific American".

La meĥanismo de Antikithera kaj unu rekonstruo troviĝas en la *Nacia Muzeo de Ateno*. Pluaj rekonstruoj troviĝas en la *Astronomisch-Physikalisches Kabinett* en Kaselo kaj en la *American Computer Museum* en Bozeman, Montano.

Retpaĝo: www.traduki.de

Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Meĥanismo_de_Antikithera